

Christian Morgenstern,

## La malsanulo

*tradukita de Willy Nüesch*

»Ofte volis morti mi...  
Tamen dankas kun sincer'  
mi pro vivo kaj sufer'  
en metita nun' kaj ĉi.

Tiel restos ja tempet'  
por forigo de difekt',  
eĉ sen veno al perfekt'  
pliboniĝos mia pret'.

Mi, sen pov', nun agi jam,  
tamen helpas al la mi',  
kiu post la nun' kaj ĉi  
agos en tie', tiam'.«

*Traduko de la Germana poemo "Der Kranke" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-72-141 (2013-08-28 18:36:59)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.blOrg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun ĉi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*